The reports of the T. E. K. committee, appearing from month to month in **Amerika Esperantisto** will show that careful attention has been given to every detail. Let us show at least a partial appreciation by our immediate and cordial support of this tremendous undertaking and the overcoming of apparently insurmountable obstacles.

A successful congress in San Francisco means that Esperanto is firmly established in Usono and that Usono will be recognized by the Esperantists of other nations as among the leaders in Esperanto activities. Heretofore we have been on probation. Let us take our place where we belong!

Association Notes

Our Club Directory is enlarging itself slowly but surely. As stated before this is a permanent department of **Amerika Esperantisto**, and every club should take advantage of the advertising space offered them at practically no expense whatever. Your club listed for one whole year — 12 times — for 25 cents! If your secretary has neglected to attend to this important matter why not call it to his or her attention without further delay? We can think of a dozen clubs at this munute whose names should appear in that list. Where are they?

As you will note in our advertising pages this month, members of our national Association have two special offers made to them, — because they are members. The E. A. N. A. Poster Stamp for Esperanto and Peace, issued for our members is offered you at the rate of 2 sheets (48 stamps) for 25 cents. We have now completed arrangements for the E. A. N. A. button, made after a special design, for MEMBERS ONLY. Each member should own and wear this button. Special prices given to clubs, when a quantity is desired.

**EXTRACT FROM THE CONSTITUTION OF THE
ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA****Article XI — Amendments**

This Constitution shall not be amended, except by a two-thirds vote at any annual meeting of the Association. Proposed amendments must be endorsed by at least two Councilors or by at least twenty-five members of this Association, and, when so endorsed, notice of the same, giving full text of the proposed amendment, shall be published in the official organ, or sent to each member of the Association at least thirty days prior to the annual meeting, otherwise such amendment shall not be considered.

Proposed amendments to the Constitution of the Esperanto Association of North America:

Amend Art. IV, Sec. 2, by omitting the words "Sections 4 and 5, each Councilor casting one vote for each paying member in his division."

Amend Art. IV, Sec. 3, by adding the words "each Councilor casting one vote for each paying member in his division."

Amend Art. V, Sec. 1, by omitting the words "General Council" at the end of the section, and inserting the words "Executive Committee" in their stead.

Amend Art. V, Sec. 4, by omitting the word "(Atestoj)."

Amend Art. V, Sec. 5, by omitting the word "a" before the word "Committee," and inserting the words "an Executive" in its stead.

Rescind Art. VII, Sec. 5, and adopt, in its stead, the following section: "At the annual meeting of this Association, immediately after its opening session, the General Council shall meet and elect the remaining officers of the Association, the Executive Committee, and the chairmen of the three Standing Committees. It shall meet thereafter as often as it shall deem advisable, or at the call of the President."

Rescind Art. VIII, Sec. 2, and renumber the succeeding sections in the said article in accordance with this change.

Adopt the following, as a new Sec. 5, Art. VIII: "At any meeting of this Association only members of the Association, and those holding proxies for absent members, shall be present, unless by invitation of the presiding officer."

Amend Art. IX, Sec. 2, by omitting the word "the" before the words "Standing Committee" and inserting the word "a" in its stead.

We, members of the General Council of the Esperanto Association of North America, hereby endorse the above proposed amendments to its constitution.

Herbert Harris,
Henry W. Hetzel.

DU SONETOJ

de
HU I. KEYES

LA AMO

La sklavoj de La Amo ja atestas,
Ke ĉeno kvazaŭ el forĝita oro
Kunligas unu kun alia koro;
Ke koroj ĝoje en katenoj restas
(Sklaveco tia tiel dolĉa estas!)
Kaj, gratulante sin en ĉiu horo
Pri servo kunparenca kun adoro,
Ĝojstaze sian benan sorton festas!
Sed se la koro, pro kialo ia,
Al tiu ora ĉeno tro streĉita
Disrompon faros ĉe ĉenero ĝia,
La koro kvazaŭ io malbenita
Por ĉiam plendos pri mizero sia —
Funebros pro feliĉo jam perdita.

NOKTIĜO

La roso falas; kreskas la silento;
La ombroj for de l' monto jam forŝtelas
Radion lastan kiu tie helas.
La steloj — blovportataj de la vento
Fajreroj el brulanta okcidento —
Transformon tutpejzaĝan nun akcelas,
Dum la animo pro sentemo ŝvelas
Kaj koroj trankviliĝas je kontento.
Nun restas nek nuanco nek detalo
De l' multkolora bildo sunpentrita;
La vidajaro (sub la noktvualo),
Kvazaŭe per peniko nigrita,
Montriĝas bildo laŭ grandega skalo
Nur mase kaj konture desegnita.

THE SCHOONER "ESPERANTO"

For many years, readers of **Amerika Esperantisto** have been accustomed to see at intervals in the magazine a small item regarding the schooner "Esperanto" of Gloucester, Mass. Miss J. M. Leach, of that place, having been requested for information concerning the vessel, undertook to trace the source of the name, and wrote to Capt. Asa Baker, commanding the vessel, for information. Her letter was referred by Capt. Baker to the owners, Wm. H. Jordan & Co., and in reply, Mr. Orlando Merchant, Treasurer of the Company, wrote that when this schooner was built in 1906, he wished to get a name that was entirely original and that had never been used on a fishing vessel before. Misses Alice and Annie Jordan, were then studying Esperanto, and Mr. Merchant chose "Esperanto" for the name of his boat. He states this is the only vessel bearing the name.

EL LA FILOZOFO DE IU

Ia foje mi estis tre feliĉa, kiam bona amiko flustris ĉe mia orelo "Avertu! Vi estas nur stulta egoisto erotika * * * malsaĝulo."

Tiam ĉar mi sciis ke li diris la veron, mi tre malĝojigis ĝis la alveno de la kara Diablo kiu diris al mi:—Ne atentu lin: tio kion li diris faros al vi nenian bonon: vi ne faris vin mem, vi ne elektis viajn praulojn, nek viajn ĉirkaŭajn influojn. Ĉi tiuj determinis viajn agojn. Krome, ĉu ne la kulpoj estas al la aĵoj kiujn la Naturo projektis por siaj propraj celoj? Ĉirkaŭrigardu! Ĉu ne aliaj faras simile? Gajigu vin.

Tiam mi rekuraĝigis kaj diris, mi faros pli bone, kaj mi antaŭeniris farante laŭ la filmo de la sortoj.

"Ni estas alligitaj al la rado."

El la Ĥina tradukis

J. W. Snider

Noto de la tradukinto: Respondante al multaj demandantoj; Iu estis viro kiu loĝis sur la tero antaŭ multaj jarcentoj. Lia sola verko estis formangata de kozaka ĉevaleto dum la Boks-

ista ribelado. Li lasis grandan familion. Kelke da posteuloj nun sidigas sur Eŭropaj tronoj. La saĝa amiko jam ne flustras la veron ĉe la oreloj sed la Diablo ankoraŭ ilin flatas.

OUR GUESTS

Among recent visitors to the Esperanto Office, West Newton, Mass., were H. R. Peterson (Conn.), R. Goodland (Mass.) M. Amster (Ill.), Herbert Harris (Me.), Ko Fo (Mass.) and Arthur Brooks Baker, ex-Editor, A. E. (N. Y.).

KIEL ONI FARIĜAS DENTISTO


de Lehman Wendell

Unue eble estus bone klarigi kial mi fariĝis studento unu fojon plu; mi, plenkreskulo, kiu jam estas sufiĉe aĝa por posedi edzinon, hejmon, riĉon. Ha! jen la sekreto; edzino, hejmo, riĉo, — en tiuj ĉi tri vortoj kuŝas la klarigo. Kiel aliaj viroj, mi sopiris al belega edzino (pardonu mian senkaŝmecon), sed por kapti tian estajon oni bezonas hejmon, kaj por konstruigi hejmon oni bezonas monon. Bedaŭrinde, mono estis por mi ĉiam tro malabunda en okcidenta Usono, kie mi loĝis, kaj tial mi fine forlasis mian hejmon kaj venis al ŝtato Minesoto, urbo Mineapolo, por tie serĉi laboron, monon kaj la alian aferon pri kiu mi supre parolis. Sed laboron mi ne trovis. Ŝajnas ke la aferistoj tie ĉi neniam aŭdis la vorton laboro, ĉar kiam ajn mi demandis laboron mi nur vidis kapskuon. Mi piediris 238 mejlojn serĉante laboron, sed ĉiam la sama rezultato. Unu tagon post tridekmejla marŝado tra la urbo mi sidiĝis sur la trotuaro, elprenis el mia poŝo pecon da kreto kaj komencis kalkuli sur la pavimo. Mi kalkulis jene: ŝuoj kostas kvar dolarojn; mi eluzos po unu paro en ĉiu semajno; konstanta marŝado pligrandigas la apetiton, kaj granda apetito postulas dikan monujon. Konkludo: ne plu serĉu laboron. Vere brilanta ideo, ĉu ne? Sed, kion fari sen laboro? Profunda meditado nun komenciĝis kaj multaj ideoj venis al mi en la kapon. Mi pensis ke eble estus bone fariĝi almozulo kaj iri de domo al domo almozpetante, sed antaŭ ol fari definitivon decidon mi iris al la urba biblioteko kaj serĉis statistikojn pri tiu profesio kaj trovis ke ĝi ne estas multe pli bona ol la leĝa profesio. Mi pensis ke eble estus bone preni ĉevalaĉon kaj fivagonon kaj kolekti ĉifonojn, aŭ starigi fruktvendejon en angulo de strato, aŭ fariĝi ĵurnal-bubo, sed ĉiuj tri profesioj estis superplenaj je kandidatoj kaj tial mi iris al la hejmo de mia frato, prunteprenis bonegan manĝon kaj iris liten. Dum la nokto mi rememoris ke amiko mia, dentisto, jam antaŭ kelkaj jaroj konsilis ke mi studu la dentistarton, kaj li eĉ promesis helpi min finance. Ju pli mi pensis pri la propono des pli bona ĝi ŝajnis kaj la sekvantan tagon mi vizitis la universitaton kaj kiel rezultato de tiu vizito mi fine enskribiĝis en la universitata Kolegio de Dentistarto. Jen mia historio, — iomete stranga, eble, sed vera.

La klaso estas granda, konsistanta el cent gestudentoj. Jes, mi diras ge- ĉar ok estas fraŭlinoj. Imagu fraŭlinon eltiranta dentegon el la buŝo de ebria vagulo; certe ne agrabla penso; sed, tamen, tio ne koncernas min aŭ vin, kaj se plaĉas al ili eltiri dentaĉojn lasu la anĝel-

ojn tion fari. La studentoj venis el diversaj partoj de la mondo; el Svedujo, Norvegujo, Germanujo, Rusujo, kaj el multaj Usonaj ŝtatoj. Unu sinjoro venis el Varsovio. Li estas Esperantisto kaj konas La Majstron, Kabe, Belmont, kaj aliajn famulojn. Kiam ajn ni interparolas en la internacia lingvo la aliaj studentoj aŭskultas per "streĉ-itaj" oreloj kaj la okuloj elstaras kiel nefirmaj butonoj sur surtuto. Ili ne povas kompreni kiel mi, flavkapulo, povas paroli kun Judo en nekonata lingvo, kaj ju pli ni babilas des pli iliaj buŝoj malfermiĝas, ĝis ili ĉiuj aspektas kiel kantantaj ranoj. Mi ofte parolas pri Esperanto al miaj samklasanoj kaj ili ĉiam tiel interesiĝas ke mi eble organizos klason la proksiman jaron.

Pri miaj studoj mi povus skribi tutan libron sed ne estas mia intenco tiamaniere tedi la legantojn de **Amerika Esperantisto** kaj tial kelke da paĝoj sufiĉas. Mia plej malfacila studo estas anatomio. Ne



La kokso, sen muskoloj, kiel ĝi aspektas al kuracisto kaj al karikaturisto

sufiĉas ke ni nur supraĵe studu homon; ni devas plej profunde scii ĉion pri li, ĉar la profesoroj tie ĉi ŝajnas pensi ke se oni ne povas detale priskribi la piedfingrojn, ekzemple, oni ne povas eltiri denton. Profesoro, laŭ mia opinio, estas stranga estaĵo; li estas tro postulema. Mi vetas cigaraĉon ke mi povus eltiri denton eĉ se mi neniam vidus piedfingron. Profesoro, mi diris, estas stranga estaĵo. Vi, kiu legas tion ĉi, ankaŭ estas stranga estaĵo. Kial? Aŭskultu!

Jen Estas Vi

La ordinara viro (aŭ virino; estas negrave) konsistas el la samaj substancoj trovataj en 1200 ovojn. Sin trovas en li sufiĉe da gaso por pleniĝi balonon kaj porti lin super la nubojn. Li enhavas sufiĉe da fero por fari kvar ordinarajn najlojn. El lia graso oni povus fabriki 75 kandelojn. Troviĝas en li sufiĉe da fosforo por fari 8,064 skatoletojn da alumetoj. Ankaŭ troviĝas en li 45 litrojn da akvo, 6 kulerojn da salo, sukerojn da sukero (paranteze mi volas aldoni ke mi konas fraŭlinon kiu sendube enhavas barelon da sukero, ŝi estas tiel dolĉa. Ne ridu, mi petas). Viro havas 500 muskolojn, 200 ostojn, 18 litrojn da sango, 60 metrojn de vejnoj, 7 metrojn de intestoj. La koro estas duobla pumpilo, kiu en la daŭro de 24 horoj pumpas 16,000 kilogramojn da sango.

Por faciligi miajn studojn mi havas skeleton en mia ĉambro kaj mi jam sentas ameton al mia samĉambrulo. Mi nomas lin "Bill." Bill estas tre silentema viro. Li ne povas paroli iun lingvon; eĉ Esperanto ŝajnas al li tro malfacila. Sed Bill povas ridi, kredo min,—de unu orelo ĝis la alia, kaj li neniam laciĝas tion fari. Kion ajn mi faras, Bill nur ridas. Mi studas; li ridas. Mi manĝas; Bill ridas. Mi dormas kaj ronkas; li daŭrigas sian ridadon. Mi eliras el mia ĉambro kaj faras promenadon, sed Bill restas hejme kaj preskaŭ krevigas sian kapon per ridado. Jes, vere, li estas tre stranga viro. Bill ankaŭ estas filozofo. Kiel mi jam diris, li estas mutulo kaj ne parolas iun lingvon, kaj, tamen, li povas multe diri per siaj du grandaj okul-kavoj. Li ĉiam rigardas min tiel mistere, tiel kviete, tiel persiste, ke iafoje frostotremo trakuras mian spinon. Unu tagon mi vidis klare ke Bill volas paroli al mi. Li rigardis min per tiaj traborantaj okuloj ke mi fine demetis mian libron kaj rigardis lin rekte en la okulojn. Tiam li ekparolis per siaj okuloj.

"Kia stranga mondo," li diris, "estas tiu sur kiu vi loĝas! Ĝi estas nur sensignifa polvo inter la aliaj ĉielaj korpoj. Sur tiu ĉi polvo troviĝas mikroskopaj estaĵoj, kiujn oni nomas homoj. Ili estas strangaj kreitaĵoj, ridinde strangaj. Ili laboras kiel formikoj, konstruante kaj elpensante, elpensante kaj konstruante. Per mirinda intelekto ili konstruas belegajn urbojn, kiujn ili lumigas per lumo pli stranga ol sunlumo; sur veraj palacoj ili iras tien kaj reen sur la maro, sen veloj, sen remiloj; ili flugas super la nuboj kiel birdoj, kaj naĝas en la profundaĵo de la maro kiel fiŝoj. Per mirindaj senĉevalaj veturiloj ili povas tiel rapide veturi ke distanco ne plu ekzistas. Per strangaj fadenoj, kiujn ili streĉas de unu kontinento al alia, ili povas interparoli, kvankam ili estas malproksime unu de la alia je miloj da mejloj. Vere ili havas la povon de dioj. Sed meze de ĉio, io sensignifa okazas kaj kiel fulmofajro unu nacio sin ĵetas kontraŭ alia. Kiel

sovaĝaj bestoj ili buĉas unu la alian, kaj ĉio kion ili dum tiom da jaroj faris detruigis, kaj post la buĉado kaj sangoverŝado ili devas unu fojon plu komenci en la komenco, konstruante kaj elpensante. Kiaj idiotoj! Kiaj azenoj!” Dirinte tion li ekridis tian vastan sarkasman ridon ke mi tremis de kapo ĝis piedo. Jes, Bill estas filosofo.


La unuan de Decembro estis memorinda tago kaj neniam mi forgesos ĝin. Tiun tagon ni komencis sekcadon. Kaj kio estas sekcado, vi demandas vin. Ĝi estas la lerta eltranĉado de muskoloj, nervoj, vejnoj, arterioj, kaj tiel plu, el homa korpo, por ke oni povu pli bone studu ilin. Por tion fari kompreneble oni bezonas kadavron, kaj kadavrojn ni certe trovis, tridek ses entute. Sed mi devas pli malrapide disvolvi mian rakonton aŭ eble vi svenos pro teruro. Tial ni parolu pri vestaĵoj, kiel faras la fraŭlinoj. Ĉiu membro de la klaso estis vestita per longa blanka supervesto kaj ĉiu portis skatoleton da akraj tranĉiloj. La fraŭlinoj kaj kelkaj sinjoroj surhavis blankajn ĉapeletojn. Ni estis tre silentemaj. Neniu parolis; neniu ridis; estis kvazaŭ ni baldaŭ partoprenus en funebro. La manoj de la sinjoroj iomete tremis, kaj la vizaĝoj de la fraŭlinoj estis palaj kiel novelavita naztuko. Fine la oka sonoris kaj ni sciis ke nun ni devas eniri la sekcad-ĉambrojn. La klaso estis dividita en tri sekciojn kaj ĉiu sekcio havis apartan ĉambrojn. Kuraĝa kiel leono mi eniris mian. Ĉielo, kia vidaĵo! Neniam, mi forgesos, eĉ se mi vivus mil jarojn. Mi vidis ses ferajn tablojn kaj sur ĉiu tablo kuŝis nuda kadavro, rigardanta tre atente la plafonon. Ĉiuj ses estis malbelaj preter vortpovo. La odoro estis pli forta ol la odoro de putranta hundo, mortinta en April kaj kuŝanta en la strato ĝis Aŭgusto. Ĝi estis miksaĵo de putranta karno, karbola acido kaj kreosoto. Mi volis forkuri kaj neniam plu reveni, sed estis senutile ĉar mi jam pagis mian kotizajon al la universitato. Tial mi fermis miajn okulojn, por tiel diri, kaj elprenis miajn tranĉilojn. Ni komencis sekci la ventron kaj mi trovis ke la muskoloj de la ventro aspektas kaj ankaŭ odoras kiel bone bolita porkaĵo. Tion ankaŭ diras la profesoroj, kaj tial ne estas simpla imago. Mi kompreneble ne plu povas manĝi porkaĵon.

Unu tagon io mirinda okazis. La muskoloj de la ventro estis eltranĉitaj kaj delikata membrano kuŝis sube, kovrante la internajn organojn. Kun granda intereso mi laboris, fine trovis ion, kion mi tute ne komprenis kaj devis iri al mia sekcad-libro por trovi klarigon. Ki- am mi revenis al la kadavro mi preskaŭ ŝtoniĝis pro surprizo. La membrano de la ventro malrapide kaj ritme leviĝis kaj malleviĝis. Mi ne povis kredi miajn proprajn okulojn kaj mi demandis mian kunulon ĉu li ankaŭ vidas. Jes, li vidas. La kadavro spiras. Ni vokis aliajn studentojn kaj ankaŭ ili vidis la spiradon. Meze de la komuna konsterno ni trovis la kaŭzon. La studento kiu laboris sur la alia flanko

de la kadavro uzis sian tranĉilon tiamaniere ke li ritme enŝovis la ri-
pojn, kaj kiam ajn li ekŝovis, la membrano moviĝis. Tiel spiris la
kadavro.

Sekciisto ĉiam portas kun si la odoron pri kiu mi parolis. Kien
ajn mi iris la odoro sekvis kiel fidela hundo. Eble mi iris laŭ la strato,
renkontis ĉarman fraŭlinon kaj haltis por skui ŝian etan manon kaj
babili. Kaj ĵus kiam mi etendis mian manon ŝi ekflaris la odoron, kaj
tiel rapidege ekforkuris ke mi povis nur vidi rapide svingantajn bra-
kojn kaj krurojn.

Mi volas aldoni ke spite malagrabloj ni iom post iom kutimiĝis
al sekado, kaj iafoje ni eĉ tagmanĝas en la samaj ĉambroj. Kadavro
ne plu estas io abomena, sed male ĝi estas mirinda maŝino kiun oni
studas kun plej alta plezuro kaj profito.



Nun, se la pli maljunaj legantoj pardonos min, mi diros kelkajn
vortojn al la gejunuloj. Ni diru do ke fraŭlino perdis sian fontan-
plumon aŭ sian naztukon aŭ ian ajn negravaĵon. Ŝi tuj komencas
plori. Ni diru plue, ke juna sinjoro iras al sia amikino por peti ŝian
manon, kaj ŝi diras "ne." Li esploras. Nu, ĉu vi komprenas kial ili
ploras? Vi eble respondos per tre kutima esprimo kaj diros ke ili
tion faras ĉar la koro iĝis peza pro malĝojo, sed tio estas absurda. Ne-
nia ŝanĝo okazis en la koro, absolute nenia; ĝi havas precize la saman
pezon kiel antaŭe, kaj tial vi ne devus kulpigi tiun kompatindan or-
gonon. Ne, kiel mi jam diris pli frue en mia rakonto, la koro estas
nur simpla pumpilo kaj iu ajn idioto scias ke pumpilo havas nenion

por fari rilate al amindumado. La afero havas alian kialon kaj se vi rigardos mian bildon mi klarigos. La bildo, mi volas diri, estas de mi mem. Ĉu mi ne havas belan okulon? En la bildo vi trovos la jenajn: 1. larm-glando; 2. larm-tubetoj; 3. larm-sako; 4. nazo-larm-kondukilo (la lasta troviĝas en la nazo mem). Nu, kiam la fraŭlino diras "ne" kaj la sinjoro esploras certa nervo stimulas la larm-sakon kaj ĝi eligas larmojn. Ili fluas laŭ la okulo ĝis la larm-tubetoj kaj per ili estas kondukataj al la nazo-larm-kondukilo kaj kiam ĝi iĝas tro plena la larmoj enfluas en la nazon kaj la junulo devas preni sian naztukon kaj blovi sian nazon. Sed se la sinjoro ploregas eble la larmoj ne povas sufiĉe rapide enflui en la larm-tubetojn kaj tiam ili fluas laŭ la vangoj kaj kolektiĝas sur la pinto de la nazo. Simpla klarigo, ĉu ne?

Vi eble miros kial mi tiel multe skribas pri anatomio, sed mi tion faris ĉar ĝi estas la plej grava studo kiun ni havas la unuan jaron. Ĝi estas la fundamento de nia profesio, kaj la tutan unuan jaron ni povas nek dormi, nek manĝi, nek viziti, sen konstanta cerbumado pri nia anatomio.

Ripozi sen movet'.
Kun unu sola devo,
Sidanta sur montet',
Ho, se mi estus roko,

Mi dormus nek, mi manĝus nek,
Mi eĉ ne lavus min;
Mi sidus tie jarojn mil
Ripozante, kredu min.

La Usonaj Insuloj

Sendube oni surpriziĝos lernante ke la Usona Standardo flirtas super ok mil insuloj. Laŭ raporto ricevita de la Nacia Geografia Societo, ilia loĝantaro egalas dek milionojn. Kvarcent milionoj da dolaroj el Amerika kapitalo estas procente donitaj en ĉi tiuj insuloj, kaj ĉiujare ili sendas al Usono produktaĵojn je la valoro de cent miliono. "Porto Rico," "Hawaii" kaj la "Alaskan" Insuloj montras mirigindan plivastiĝon de kiam ili alvenis sub la "Steloj kaj Strioj." Antaŭ dek kvin jaroj estas nur unu lernejo en Porto Rico. Nuntempe preskaŭ ducent mil geknaboj estas studentoj en la lernejoj. 365,000 tunoj da sukero estas produktataj ĉiujare kontraŭ 65,000 dum la Hispana reĝimo. Hawaii montras similan prosperecon.

Tradukis el "The American Boy"

Li—Fraŭlino Smith, ĉu vi amas bestojn?

Si—Ĉu vi deziras komplimentojn?

"Ĉu vi loĝis tie ĉi vian tutan vivon?" demandis vojaĝanto al kamparano.

"Ne ankoraŭ," estis la respondo.

—W. H. H.

CLUB DIRECTORY

BERKELEY, CALIF.

Berkeley Esperanto-Rondo, Berkeley H. S.
A. S. Vinzent, Sec'y, 2429a Ellsworth St.,
Meets every Monday, 8.00 P. M.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park
Fr. Kovarik, 2502 S. Kedzie Ave., Sek.
La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island ave.
F-ino R. Votlučka, 1539 W. Jackson Blv. Sek.
Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

CINCINNATI, OHIO.

Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street.
A. F. McKinney, Sec. L. B. Harrison Hotel.

CLEVELAND, OHIO.

La 7 amenhofa Klubo.
F-ino L. B. Weber, Sek., 2036 W. 48th St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer
Bldg., open daily. Library at disposal of
everybody, daily 7 A. M.-9 P. M., except Tues.
and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8-10
P. M.

La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne, Magnus
Butzis Library, Harper & E. Grand Blvd.

NEW YORK (Bronx) N. Y.

Bronx Esperanto Society, Morris H. S.
C. C. Coigne, Sec'y, 243 Bedford Pk. Blvd.

NEW YORK, (Manhattan) N. Y.

The New York Group, Wash. Irving H. S.,
Jos. Silbernik, Sec'y, 240 E. 19th St.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg.,
Herbert Harris, Sec'y, 10 Henry St.

ROCKFORD, ILLS.

Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St.
Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmele St.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society
Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

SALT LAKE CITY, UTAH.

Salt Lake Esperanto Club,
Mrs. F. M. McHugh, Sec., 4002 So. State St.

STATEMENT OF OWNERSHIP, ETC.

**Of Amerika Esperantisto, published monthly at West Newton, Mass.,
required by the Act of August 24, 1912**

Editor, C. H. Fessenden, M. D., Newton Centre, Mass.

Managing Editor, same.

Business Manager, same.

Publisher, The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.

Owners: (If a corporation, give names and addresses of stockholders
holding 1 per cent or more of total amount of stock).

The Esperanto Association of North America, Inc., Newton Centre,
Mass., Ernest F. Dow, West Newton, Mass.

Known bondholders, mortgages, and other security holders, holding
1 per cent or more of total amount of bonds, mortgages, or other
securities: None.

(Signed) C. H. Fessenden, Business Manager.
Massachusetts, ss. Sworn to and subscribed before me this 5th day
of April, 1915.

(Seal) Fred R. Campbell, Notary Public.

My commission expires Jan. 1, 1920.

Kelnero: Ĉu vi deziras laktukon?

Gasto: Nepre ne. Mi ja neniam manĝis tukon, certe ne lak-
tukon, kaj mi ne komencos nun.

—Ho Ho.

ORDER BLANK

The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.

Please send me at once, to above address, the books, etc., checked below, for which I enclose the sum of \$.....

Name

Address

| | |
|---|--|
| Year's subscription to the monthly magazine, AMERIKA ESPERANTISTO, \$1.00 | |
| COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), with vocabularies, \$1.25 postpaid | |
| Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with copy of COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, \$2.00 | |

Send me also Complete catalog of Text-books and Literature 10c.

APPLICATION FOR MEMBERSHIP

Fill out this application legibly and mail to Dr. C. H. Fessenden, General Secretary, The Esperanto Association of North America, Newton Centre, Mass.

I hereby apply for membership in The Esperanto Association of North America, and indicate by placing X in the column at the right the extent to which I will be able to cooperate in the work of said Association.

Name

Address

| | |
|--|--|
| Active Membership, 50 cents enclosed | |
| Special Membership, \$2.50 enclosed | |
| Sustaining Membership, \$10.00 enclosed | |
| I shall be glad to assist in the work of propaganda, and wish you to notify the nearest propaganda leader of the Association | |

A C O

THE LATEST ESPERANTO GAME

EVERYBODY'S PLAYING IT!

Finest Quality Cards. Complete Directions for Playing

50c

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, Inc.

West Newton, Mass.

JUST SAY

“Send me a Coupon Ticket”

**The easy, practical, economical way to
buy books**

\$5.50 for \$5.00

The American Esperantist Co., Inc.

West Newton, Mass.

Date

A. S. Vinzent, Treasurer,
Tutpacifika Esperanta Kongreso
San Francisco, California.

I the undersigned desire to become a member of the Tutpacifika Esperanta Kongreso and enclose

check
money order
transpagilo } to cover the following;

....Congress Card (s)@.\$5.00.....\$

....Helpkongresa Card (s) .@.\$2.50.....

\$.for....room (s)@.\$5.00.....

Guarantee Fund _____
\$

Please reserve in my name....room (s) in
private family
hotel at about \$....
apartments
per day, said reservations to begin
(date)

Name
(Mr., Mrs., or Miss)

Address

City State



KIEL PLAĈAS AL VI

(Translated by Ivy Kellerman, A. M., Ph. D.)

The leather edition of this wonderful Shakespearian translation is fast becoming exhausted, and another will positively not be issued. We have a few copies of this book remaining on hand, beautifully illustrated, bound in flexible green leather and gold stamped, which we are offering at

\$1.00 Each

A de luxe edition, satisfying the most fastidious taste

ORDER TODAY - QUANTITY LIMITED

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, Inc.

West Newton, Mass.

**MEMBERS OF THE
Esperanto Association of North America
(INCORPORATED)**

**THE POSTER STAMP FOR
ESPERANTO AND PEACE**

Special to you, 2 Sheets, 48 Stamps, 25 Cents

THE "E. A. N. A." BUTTON

**White Celluloid, with Star and E. A. N. A. stamped in Green
SMALL, NEAT, NEW!**

5 Cts. Each

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

NEWTON CENTRE, MASS.